

kontakto

*tutmonda
esperantista
junulara
organizo*

**N-ro 1
Volumo 3/1966**

kontakto

Revuo de Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo
(Junulara Sekcio de UEA)

N-ro 1

Volumo 3/1966

Prezo: individua numero - 2,20 ned. gld.
(9 steloj)

Jarabono (minimume kvar numeroj) -
8 ned. gld. (32 steloj)

Redaktoro: Humphrey Tonkin
Redaktoro ekde numero 2, 1966:
Stefan Maul, Hubertusstr. 2a,
625 Limburg/Lahn, Germanio

Teknika redaktoro: Adriaan den Haan

Desegnisto: Jan Schaap

Administrantino: Eliza Weide

Administrejo, al kiu oni sendu ĉiujn
abonkotizojn, reklamojn ktp.:

Kontakto, Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando

Bankisto de UEA: Mees & Hope,
Blaak 10, Rotterdam-1

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v.,
Nieuwe Binnenweg 460, 462,
Rotterdam-6, tel. (010) 25 66 45

Reklamtarifo: La redakcio liveros kon-
traŭ peto. Ekzistas speciala malalta
tarifo por esperantistaj entreprenoj.

Manuskriptojn por Kontakto oni sendu
al la redaktoro en du ekzempleroj.
Ili devas esti klare tajpitaj en
korekta Esperanto, kaj ĉiuj supersignoj
devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese
enskribitaj permane. Oni skribu sur
unu flanko de la papero kun interlinia
spaco kaj kun granda maldekstra mar-
ĝeno. Sendu materialon aerpoŝte. Ĉe
leteroj destinitaj al aperigo oni sekvu
la samajn instrukciojn.

La redaktoro aparte bonvenigas arti-
kolojn originalajn aŭ tradukitajn pri
temoj sociologiaj, kulturaj, sportaj kaj
vojaĝaj. Li ankaŭ daŭre bezonas fotojn,
kun aŭ sen artikoloj. Ĉiu materialo
havu iun apartan intereson por la ju-
nularo kaj artikoloj prefere estu ver-
kitaj de gejunuloj mem. Provizore la
redakcio ne akceptas poeziaĵojn.

La redakcio de Kontakto ne akceptas
respondecon por la opinioj esprimitaj
en subskribitaj artikoloj, kiuj ne
necese akordiĝas kun la opinioj aŭ
principoj de TEJO. Por la enhavo de
la artikoloj respondecas nur la sub-
skribintoj mem.

Krome, la redakcio rezervas al si la
rajton mallongigi aŭ alimaniere adapti
subskribitajn artikolojn laŭ sia bon-
trovo.

La fondaĵo junulara gazeto estas
oficiala fondaĵo de UEA kaj ĝia celo
estas subteni la gazeton de TEJO dum
ĉi tiu frua periodo de ĝia eldonado.
Kontribuaĵojn oni faru rekte al UEA
aŭ ties perantoj, al landaj sekcioj aŭ
al estraranoj de TEJO.

ENHAVO

- 1 Kelkaj vortoj de la redaktoro
- 1 Kiu estas tiu nova redaktoro?
- 2 Paul Schunck: Urboj
- 4 W. Włodarczyk:
Kreskado pli rapida
- 5 D-ro K. Kussinszky:
Pécs, kongresurbo
- 8 Andreo Szabó:
Pravo post jarmiloj
- 9 Junulo:
Kion ni faru pri sekso?
- 11 Jeremy White:
La Kolegio Strathmore
- 15 Sandor Bako: Ĉasista festeno
- 17 Mozaiko

kelkaj vortoj de la redaktoro



Estas kelkfoje mirinde kiel rapide la esperantista publiko akceptas al sia sino siajn instituciojn. Tio estas certarilate konsterna fenomeno, certarilate ege kuraĝiga. La gazeto Kontakto, kiu tiel hezite faris siajn unuajn elpaŝetojn antaŭ tri jaroj, nun fariĝis tute akceptita parto de la Esperanta fenomenaro. Eĉ relative superan pozicion ĝi gajnis inter la gazetaro. Sed pli rimarkinda estas la fakto ke la idealo kiu naskis la revuon ankaŭ trovis akcepton en la pensmaniero de la esperantistoj. Kiu estus kredinta en 1957, kiam la eta TEJO baraktis kontraŭ grandegaj organizaj kaj financaj problemoj, ke venos tago kiam la organizita esperantista junularo nombriĝas per kvin ciferoj, kiam miloj da infanoj lernas la lingvon en la lernejoj, kiam la influo de TEJO etendiĝas al ĉiuj mondopartoj kaj en ĉiujn angulojn de la ĝenerala Movado? La junularo malfermis novajn fenestrojn, forbalais polvon, refunkciigis ŝimintajn aparatojn.

Unu el la rimedoj per kiuj la juneca idealo manifestiĝas estas la revuo kiu kuŝas antaŭ vi. Gazeto per Esperanto — gazeto kiu enprenas la mondon de la junularo en la Internacian Lingvon, gazeto kiu kontraŭbatalas la mensan fermitecon kaj sektismon kiuj nun tiel rapide kaj definitive

malaperas, forpuŝite de la nova realismo kiu fontas de la junularo. Se, kiel redaktoro, mi fieras, espereble vi pardonos min.

Sed la akcepto kiun Kontakto trovis ĉe la publiko estas ankaŭ konsterna pro tio ke institucioj estas kutime konsiderataj firmaj kaj stabilaj. Oni facile forgesas ke antaŭ tri jaroj ne ekzistis Kontakto, ne ekzistis ĝiaj funkciuloj, apenaŭ ekzistis eĉ la kapabloj ĝin produkti. Depost malfrua 1962, teamo da homoj kunlaboris por ĝin produkti. Miaj helpantoj estis Adriaan den Haan, kiel teknika redaktoro, Jan Schaap, kiel desegnistino, Elly Wijnands, kiel administrantino. Ĉiam ili sindone kaj perfekte kunlaboris. Sekve, kun preciza akurato la gazeto regule aperis.

Nun venis tempo por ŝanĝo. La teamo restos, sed la redaktoro transiros al novaj taskoj en TEJO. Triste estas demeti la redaktoran ruĝan krajonon, sed ĝojige transdoni ĝin al tiel kompetenta posteulo kiel mia delonga amiko Stefan Maul. Estas ankaŭ ĝojige scii ke Kontakto sufiĉe fortas por elteni la ŝanĝon kaj la sekvajn administrajn streĉojn. Necesas nur aldoni dankojn al ĉiuj kontribuantoj kaj speciale al la konsilantoj kiuj donis al mi la helpon de siaj redaktoraĵaj spertoj — kaj ankaŭ al ĉiuj vi, legantoj.

Por la estonteco, helpu al la redaktora teamo. Skribu al la redaktoro, konsilu, sugestu, legu. Kaj memoru ke Kontakto ne elfalas la ĉielon nek ŝprucas el la tero, sed produktiĝas de dediĉaj laborantoj kaj — presisto kiu bezonas pagon. Varbu abonantojn, junecu iomete, agadu, kaj Kontakto floros.


Humphrey Tonkin

Kiu
estas
tiu
nova
redaktoro?

Nu, nova li jam ne estas. 25 jarojn malnova, neoficiale. Ĉar oficiale li ne naskiĝis. Sed laŭ aserto de siaj gepatroj li kriis la unuan fojon dum aŭtuno 1940 en Jugoslavio. 4 jarojn poste li ĝuis belan milit-vojaĝon tra duona Eŭropo, fine restis en Bavario, aparta lando de Germanio. Je sia bedaŭro li devis viziti lernejojn: elementan (kies duan klason li eĉ devis ripeti), gimnazian kaj universitatan. En 1965 li finis la studojn de (ĉefe) filozofio kaj teologio en Munkeno kaj eklaboris kiel redaktoro de semajngazeto en la regiono de Frankfurt/Main. Li havus belan vivon, se — ja, se li ne sciis esperanton. Ĝin la malfeliĉulo lernis en 1957 kaj de tiam ne jam havis trankvilan horon: kongresoj, seminarioj, vojaĝoj, verkado, 1960-1963 redaktoro de Birdo, ekde 1964 eldonanto de Kristana Ekumeno, ekde 1966 redaktoro de Espero Katolika kaj nun do ankaŭ de Kontakto, pluraj postenoj en diversaj asocioj ktp. Cetere li estis "modela fraŭlo" (laŭ aserto de certa TEJO-funkciulo). Sed modela fraŭlino sukcesis kapti lin (aŭ inverse), tiel ke nun jen estas mod(ela) paro. Antaŭ tiu katastrofo li travivis aliajn, nome li laboris i.a. kiel scienca sekretario, leterportisto, kelnero, instruisto kaj fabriklaboristo. Do vi povas imagi, ke li estas riĉa — je pli-malpli bonaj spertoj...

Stefan Maul ekredaktos Kontakton je la venonta numero.

URBOJ



Aŭtuno en Trier. "Knaras radoj, krakas pordoj, fajfsirenas aŭtoj...
Ĉielenas templa pinto — reliefe."

Parizo. "La tasko de la cigno estas cigni... Kolombi estas la kolomba
devo..."

Mateno en Saarbrücken. "Kaj jam la urb' malhela sin frotis ĉe l'okulo,
kaj kaptis siajn ilojn, maljuna laborulo..."



Kreskado pli rapida?

Ne lasttempe la antropologoj observis la interesan fenomenon de relativa plialtigado de junaj homoj: laŭ lastaj konstatoj — meze 1 cm dum jardeko. Do, kiel la nuna generacio aŭguras por la estonto?

Esploroj pri rapideco de la korpa evoluo de la etuloj havas en Pollando longan tradicion: niaj antropologoj kaj medicino faris multajn kontribuojn. Ĉe la Pola Akademio de la Sciencoj vicprezidentino de la Problema Kolektivo por esplorado de la evoluo de la junularo, prof. d-rino Halina Milicer, rimarkis: "La ŝanĝoj en la korpa evoluo de la junaj homoj kaj lerneja junularo en Pollando konturiĝis sufiĉe klare, ĉar la altiĝado de la viroj en la lasta tempo plirapidiĝis kaj oni povas ĝin kalkuli je 2 cm en jardeko." La nuna, postmilita generacio de la pola junularo ĝenerale kreskas pli rapide se oni komparas ĝin kun la kreskado de samaĝuloj de antaŭ duona jarcento. Ĝi ankaŭ pli frue maturiĝas.

La plialtigado en la kategorioj de la 7-12 jaraĝuloj egalas en tiu ĉi periodo al ĉ. 16 cm, kaj fariĝas ankoraŭ pli granda en la kategorio de la maturiĝado — ĉe la 14-15 jaraĝaj knaboj ĝi egalas al 21-22 cm. Por ekzemplo ni diru, ke hodiaŭa 10-jarulo povas fieri pri sia kresko — ĝi nun egalas la kreskon de 13-jaraĝa junulo el la komenco de la nuna jarcento. La pli rapidan kreskadon en Pollando, dum lastaj jaroj, prof. Halina Milicer ilustras jene: "La meza indico de la kreskado de la junuloj en la aĝo de 20-21 jaroj egalas en nia lando en la tridekaj jaroj al 160,13 cm. Dum la jaro 1960 la viroj en tiu ĉi aĝo mezuris jam 169,6 cm." Estas ankaŭ certe, ke nun la junaj viroj en Pollando laŭ la korpa evoluo estas pli maturaj kompare kun sia modelo de antaŭ 30 jaroj.

Oni ankaŭ konstatas pli rapidan kreskadon de korpalteco ĉe la studentaro. La mezuradoj pruvigis, ke dum la jaroj

1954-1961 la kresko de niaj studentoj en la altlernejoj pligrandiĝis de 171,7 ĝis 173 cm. La studentinoj, kiel kutime ĉe la virinoj, ĉiam malsuperas la studentojn rilate la kreskon, sed ankaŭ ili atingis tute altan nivelon, meze 166,1 cm, kompreneble ne konsiderante la modajn altajn hararanĝojn kiuj je kelkaj aŭ dekelkaj centimetroj plialtigas la virinan silueton.

Sendube la procezo de urbaniĝo de la lando influas al la ŝanĝoj en la korpa evoluo. La urbo, kvankam posedante malpli bonan klimaton, alportas samtempe al la infanaro pli da kondiĉoj favorantaj ĝian evoluon, ol la kamparo. Ekzemple, en la urbo estas multe da lernejoj kaj pro tio gelernantoj ne devas ĉiutage fari la longajn kaj laciĝajn iradojn al la lernejo. Cetere la urba infano pli ofte povas bani sin kaj — kompreneble — estas pli sisteme nutrata. Krome la urbo disponigas al siaj infanoj pli da sociaj institucioj, kunagantaj kun la patrino en la projektado de la vartado kaj edukado. La kultura agado aŭ ekonomia evoluo disvastigas pli rapide en la urboj.

"La esploro en la junulara medio," konstatas prof. Halina Milicer, "stariĝis nin antaŭ kelkaj tre interesaj fenomenoj. Montriĝis, ke la unuan lokon en la korpa evoluo okupas la varsovia junularo, kaj tuj post ĝi, sur la dua loko, troviĝis la junularo de la laborista urbo Łódź. Dume la vilaĝa junularo, malgraŭ la pliboniĝo de ĝiaj vivkondiĉoj, daŭre ankoraŭ cedas al la urba junularo, kio ŝajne estas rezulto de la kalorie malpli bona nutrado kaj pli granda ŝarĝiteco pro la korpa laboro. Ankoraŭ unu faktoro aganta por la profito de la urba junularo,

precipe de la granda urboj, estas la vasta ĝeneraliĝo de la higieno kaj sporto." Kompreneble ne temas pri la rekorda sporto, sed pri la ĉiutagaj ekzercoj sur la lernejaj sportterenoj kaj en la sportaj kluboj. Tamen en Varsovio okazas diferencoj en la altlernejoj. Estas notinde, kaj unuavide malfacile klarigeble, ke la junularo akceptita de pli popularaj altlernejoj kaj trapasinta pli striktan selektan reton, distingiĝas plejparte per bonaj korpvaloroj. Ekzemple, studento de la Varsovia Politekniko — kie estas plej malfacile akceptiĝi pro la grandega alfluo de kandidatoj — estas junulo kiel piceo. La meza alteco de la studento de tiu ĉi altlernejo egalas en la jaro 1962 175,3 cm kaj estis 2,3 cm pli granda ol la meza alteco de la studentoj de la aliaj altlernejoj.

Estas interese ekscii, kiel — laŭ la opinio de la antropologoj — formiĝados la estontaj generacioj de polaj junuloj kompare kun la junularo de okcidenta Eŭropo kaj de Usono. Malfacile ĝi horoskopas komplete. Tro multaj faktoroj influas la korpan evoluon de la homo, por ke oni povu facile profeti pri la aspekto de lia silueto ekzemple post 20 aŭ 25 jaroj. Prof. Milicer diras: "Ĉiuokaze ne estas dubeble, ke ni altiĝas. La usona junularo, kiel juĝas la usonaj sciencistoj, jam atingis la apogean nivelon de sia korpa evoluo. Ĉe ni tiu ĉi momento fine okazos, kvankam ne rapide. Ĉiuokaze la distanco kiu apartiĝis la iaman generacion de poloj kaj polinoj de la usona, aŭ ĝenerale de la anglosaksa junularo, en la nuna tempo grave malgrandiĝis. Estas tamen malfacile antaŭvidi nun, ĉu la polo en la jaro — ni diru — 1980 egalos la kreskon de la pinecaj skandinavianoj." Ni tuj aldonu: se ni eĉ restos en la nuna kresko, tio tute ne malbonas. La junaj geviroj de nia morgaŭo estos homoj sportaj, korpe lertaj, sanaj kaj bonaspektaj.

W. Włodarczyk

D-ro K. Kussinszky:

PÉCS kongresurbo

Pécs... kurioza kaj nekutima nomo eĉ en la hungara lingvo. La lingvistoj ĝis hodiaŭ ne povis definitive findecidi pri ĝia origino. En la 11-a jarcento, en ĉarto de reĝo Sankta Ladislao troviĝas unuafoje ĉi tiu nomo en la formo Peuche. Kelkaj el la scienculoj asertas ke ĝi devenas el la slava traduko de la mezepoka latina nomo de la urbo: *Quinque Ecclesiae*; aliaj provas doni klarigon al la nomo el vortoj tatara, avara eĉ helena, sed la demando restis nesolvita.

De kie ajn originas la nomo, estas sendube, ke la urbo vivas, etendiĝas jam ekde dumil jaroj sur la sudaj deklivoj de la montaro Mecsek (Meček). Kvankam la arkeologoj konas sur la monteto Makár koloniojn devenantajn el la plej nova ŝtonepoko, do ĉirkaŭe sesmilarajn, tamen oni kalkulas la aĝon

de la urbo ekde la tempo kiam la romanoj konstruis konstantajn domojn sur la lokoj de la nomadaj feltendoj. Ankaŭ el ĉi tiu tempo datiĝas la unua konata nomo de la urbo: *Sophianae*. Ĝi signifis ne unusolan kolonion sed estis kolektiva nomo de longa vico da kolonioj konstruitaj dise sur la sudaj partoj de la montaro.

Sed kio okazis pri la urbo post la falo de la romia imperio? La hunoj ĉesigis la ĉi-tiean romian regadon en la kvina jarcento; poste, sekve de la granda popolmigrado, ŝanĝis unu la alian en longa sinsekvo la gepidoj, gotoj, longobardoj, fine la avaroj, kaj ili neniigis la romian kulturon. Kiam la hungaroj sub la gvidado de Ete kaj Bojta en 899 atingis la sudan finon de Mecsek, verŝajne ili trovis ĉi tie nur ruinojn, malklarajn postrestaĵojn de la brila pasinteco.

Sed la urbo baldaŭ komencis evolui denove: cent jarojn post la patrujokupado, Sankta Stefano, nia unua reĝo, jam fondis episkopejon en Pécs. La dekreto priskribanta la limojn de la episkoplando estis datita en 1009, kaj probable ankaŭ en tiu ĉi jaro komenciĝis la konstruado de la episkopa katedralo, poste famiĝinta pro siaj kvar turoj.

Post la fondo de la episkopejo ekmarŝis la evoluo kun grandaj paŝoj, unuavice sur tereno de la kulturo. Jam komence de la 11-a jarcento la urbo havis lernejojn. En la 13-a jarcento komenciĝis la konstruado de la urbomuro, kaj dekreto el 1308 jam mencias la fortikaĵon de Pécs, kvankam ĉi tiu neniam ludis gravan rolon en la historio de la lando. La plej signifa evento en la sekva jarcento tamen estas ne milita sed kultura: Reĝo



Restoracio
"Olimpia", ejo
de la interkoni-
tiĝa vespero



◁ La ĉefplaco Széchenyi kun la statuo de Johano Hunyadi

Moskeo de Jakovali Hassan kun ▷ minareto

T. E. J. O.
invitas vin!

Venu al la
22-a Internacia Junulara Kongreso



La urbo? Pécs, en suda Hungario ● La okazo? Kongreso de TEJO, la plej granda kaj grava el la ĉiujaraj renkontiĝoj de la esperantista junularo ● Kiu partoprenos? Gejunuloj, parolantoj de Esperanto, el dudeko da landoj ● Ĉu ĝi interesos min? Se vi interesiĝas pri mondaj problemoj, pri internacia vivo, pri vojaĝado, pri diskutado, teatraj eventoj, muziko, oratorado, dancado — JES ● Kosto? Minimuma

Petu tuj detalojn ĉe:

TEJO-Kongreso, Pécs, pf. 114, Hungario



Ludoviko la Granda en 1367 fondis universitaton en Pécs, la unuan en la lando. Kaj kvankam la universitato floradis nur ducent jarojn, la Pécs-anoj ankoraŭ nun kun fiereco menciadas sian malnovan universitaton kiu estas preskaŭ samaĝa al tiu en Vieno.

Sed okazis ankaŭ io alia en la 14-a jarcento: ekevoluis la industrio. Apud la akvo de la rivereto rapide fluanta el la fonto Tettye (Tetje), unu post la aliaj ekleviĝis muelejoj de la grenmuelistoj, drapfaristoj, poste tanistoj. Eĉ estiĝis ankaŭ papermuelejo. Karakteriza formo de la subtegmen- toj de kelkaj domoj ankoraŭ nun aludas al la tanista industrio en la epoko de la produktado.

Sed la pluj kulturaj eventoj superis kaj la militajn kaj la industriajn okazintaĵojn: en 1440 ĉi tie malfermiĝis la unua publika biblioteko de la lando, kaj kiam Johano Csezmicei (Ĉezmicei) — sub verkista nomo Janus Pannoni- us, apartenanta kiel scienculo kaj same kiel poeto al la plej elstaraj homoj de sia epoko — fariĝis la episkopo de la urbo, Pécs aliformiĝis al unu el la centroj de

la hungara humanismo. Bedaŭre, ankaŭ Pécs devis partopreni en la malfeliĉa sorto de la lando: post la malvenko ĉe Mohács (Mohaĉ, 1526) la turkoj dufoje atakis kaj parte detruis la urbon, kvankam ili sukcesis ĝin okupi nur en 1543. La turka okupado daŭris en Pécs 143 jarojn. La graveco de la urbo restis, sed ĝia karaktero tute alii- ĝis: ĝi fariĝis turka bazarurbo. La pli grandajn kaj belajn konstrua- ĵojn la turkoj utiligis por si mem, la aliajn ili malkonstruis kaj anstataŭe ili kreis konstruaĵojn konformajn al siaj celoj: preĝe- jojn, monaĥejojn, banejojn. Tiu- tempe estis konstruata sur la ĉef- placo la moskeo de paŝao Ghazi Kasim (Kasim la Venkinto), pri kies kupolo Evlia Ĉelevi, iama turka historiisto, skribis: "kvazaŭ ĝis estus farita de la tornisto de la ĉielo". La moskeo ankaŭ nun staras (ĝi estas katolika preĝejo), kaj ĝi estas la plej granda turkepoka memoraĵo ne nur en la urbo, sed en la tuta lando.

Ankaŭ en ĉi tiu epoko estis konstruita la moskeo de Jakovali Has- san, kiu kun sia minareto estas karakteriza vidindaĵo de la urbo kaj ofte vizitata celo de la turistoj. La turka regado ĉesis en 1686. Iom post iom finiĝis la bataloj, denove ekiris la evoluo, unuavice sur la kampo de la kulturo. Episkopo Klimó malfermis en 1776 la unuan superan lernejon de la lando por knabinoj, poste li ekfunkciigis libropresejon, kaj faris publika la episkopan bibliotekon, kiu estis bazo de la nuna Universitata Bi- blioteko.

La fino de la 18a kaj la komenco de la 19a jarcentoj estis la etapo de la industriiĝo kaj burĝiĝo. Pli kaj pli forte evidentiĝis ke la bazo de la industria evoluo estas la ŝtonkarbo. Kaj ĉirilate la montaro Mecsek estis je la helpo de la lo-

ĝantaro, ĉar malkaŝiĝis ke la sino de Mecsek kovras la plej bonan ŝtonkarbon de lando. En 1770 — kvankam en primitivaj cirkon- stancoj — estis ekspluatata la unua karbominejo, kiu fariĝis la centro de la nuntempa minejkam- po. Inter la minejoj kaj la urbo konstruiĝis la unuaj fabrikejoj, inter kiuj poste mondfama eozin- fabriko Zsolnay (Jolnai). Ĉi tiu teritorio, la orienta rando de la urbo, eĉ nuntempe havas la nomon Uzinurbo.

Ĉi tiu tempo estis ankaŭ la epoko de la riĉiĝo de la burĝaro; en tiu tempo estis konstruitaj en kelkaj stratoj de la urbocentro la familiaj domoj de la burĝaro, inter ili kel- kaj veraj ĉefverkoj de barokstila konstruado. Sed la konstanta evoluo ne haltis. Eĉ ĝia ritmo pres- kaŭ de unu tago al la alia radikale ŝanĝiĝis en la kvindekaj jaroj de la nuna jarcento. Okcidente de la urbo en la ĉirkaŭaĵo de la monto Jakaĉ la geologoj trovis novan mineraltrezoron: uranion, bazon de la atomepoko. Kune kun la evo- luo de la minado komenciĝis la enmigrado de la vilaĝa loĝantaro al la urbo kaj tio kreis la bezonon konstrui novajn loĝkvartalojn. Tiel naskiĝis en la okcidenta rando de la malnova urbo la t.n. urani- urbo, kun modernaj loĝ- kaj kon- tordomoj, magazenoj, restoracioj. Sekve de la pligrandiĝo de la nombro de la loĝantaro — la urbo havas nun 130 000 enloĝantojn — multobliĝis ankaŭ la nombro de la lernejoj kaj kolegioj. Ne estas troige diri, ke Pécs fariĝis — krom sia industrio — urbo de la lerne- joj kaj de la junularo.

Ĉi tiun urbon ni intencas prezenti al la esperantista junularo de la mondo en 1966, okaze de la 22a Internacia Junulara Kongreso.

K. Kussinszky

PRAVO POST JARMILOJ

momentbildo de sur la luno

Mola silento surverŝas la agrablan plezurĝardenon. Nur defore la zumsibloj de surluniĝantaj kosmoŝipoj aŭdiĝas iam kaj iam. La kontinuan, mallaŭtan susuron de la varmradiaj nukleaj ŝvebsateli-toj, ŝajnantaj pendi senmove en la artefarita aero, la al kutimiĝintaj oreloj jam eĉ ne rimarkas.

La junulino kubutapoge sin eklevas en la violkolora, rosmalsekiĝinta, gumece elastmola herbajo. "Tamen mi asertas, ke la praeco mem signifas nenian malplivalorecon. Tiutempe laŭ siaj ebloj ili faris eble eĉ pli, ol ni nur povus imagi."

Apud ŝi la junulo ventrokuŝe levas la vizaĝon al la ruĝiĝanta horizonto, kie la artefarita rotacio de la Luno jam aperigis la konturon de ruĝa globego: la Tero. Li reve meditas, poste ekparolas.

"Ja jes, ili faris. Sed kiuj estas tiuj 'ili'?"

"Nu kompreneble, la tiama homaro."

"Homaro... tro vasta difino. Tro vasta kaj tamen tro malvasta. Ĉar kiuj vere faris ion, tiuj tutcerte tre elstaris el la ĝenerala mezgradeco. La ĝenerale tipa homo konis nur la kontinuan penon por la ĉiutaga viveblo, ĉiutagaj brutaj bezonoj, brutaj ĝuoj, hontindaj amuziĝoj. Ĉu ja tio estus tiu 'eĉ pli', pri kiu vi parolas?"

"Ne. Ne tio, sed ke ili ekkomprenis la voĉon de la vekantoj, de la vojserĉantoj, kiuj inspiris al ili la sonĝon pri la estonteco."

"Ĉu ili ekkomprenis?"

"Jes, almenaŭ la junularo. Poste... poste la vivpenadoj eble subpremis la porprogresan sentem-econ, la porestontecan interesiĝon; sed la gejunuloj jam ankaŭ tiutempe estis la antenoj de la estonto."

"Jen, kion ili 'ekkompre-nis'!" Li ekturnas etan ŝaltŝraŭbon de la miniatura tempovizoro sur sia

maldekstra brako. Iom li turnadas la serĉmontrilon; kaj sur la malgranda ekrano ekaperas bildo de duonluma, fumvapura, homplena ĉambrego. La homoj — plejparte gejunuloj — dancades, sin svingadas, balancas kaj turnadas laŭ ia sovaĝa, orelfenda muzikritmo, kiu aŭdiĝas el la sonmembraneto de la aparato.

Andreo Szabó

"Jen ilia porprogresanta sentemo, jen ilia sonĝo pri la estonteco."

La sovaĝa, sensenca muziko krude kirlas la silenton de la delikata plezurĝardeno. Sur la ciferplato de la tempovizoro fosforeskantaj lumstriaĵoj montras la tempon, forpasintan jam antaŭ du jarmiloj: 1966.

Ŝi mute pripensadas. Poste kun firma kredo ŝi eklevas la vizaĝon al la ruĝa lumo de la giganta Terglobo, aperinta jam en plena grandeco super la horizonto. La ruĝe lumigitaj trajtoj de la knabino esprimas neŝanceleblan optimismon, mildan komprenemon, ĉionpardonan homamon, kiam ŝi rigardadas la nebulajn konturojn de la kontinentoj sur la apenaŭ rimarkeble rotacianta Terglobo.

"Nu jes... Sed tamen! Tamen ili estis tiuj, kiuj kreis la unuajn kosmoŝipojn, kiuj verkis senmortajn poemojn, romanojn pri homa heroeco, pri belo, pri amo..."

"Pri amo... Jen ilia amo!"

Sur la ekrano videblas juna homaro, sin spasme ĉirkaŭbrakanta, sovaĝe premanta reciproke, ridaĉe kriĝgargaranta pro ĝuavido. "Jen ilia amo, jen ilia sopiro por preparo de la estonto!... Ĉu ili estis, kiuj la kosmoŝipojn kreis, poemojn, romanojn verkis?... Absurdaĵo."

Li mansvingas malestime per la maldekstra brako. Pro la svingo la tempovizoro alpuŝiĝas al la brako de la knabino. La serĉmontrilo iom formoviĝas, la antaŭa bildo malaperas, la sovaĝa kriaĉado, ritma tamburado ĉesas. Sur la ekrano ekaperas koncertejo, ŝajne kun ĝuste komenciĝonta programo. Sur la podio viro parolas en ia nekonata, jam delonge formortinta nacia lingvo. Nur unu vorto perceptiĝas signifhave por la lunloĝantaj gejunuloj; nomo ĝi estas, tre konata por ili... Beethoven... Kelkajn frazojn la viro en stranga, nigra vesto ankoraŭ diras, poste malaperas. La muzikistoj, same vestitaj, ekludas. Kvazaŭ la spaco inter tempoj kaj lokoj malaperas, la melodio ŝvebe ekvivas en la kvardeka jarcento, sur la Luno... Ta-ta-ta tam... Ta-ta-ta tam... Ta-ta-ta tam... Ta-ta-ta tam... sortdoloroj, homaj ĝojoj vibrigas la artefaritan lunaeron.

La diskuto ĉesas. La lunloĝantaj gejunuloj eksilentas. Ili rigardas al la okuloj unu de la alia. Ili ŝoviĝas reciproke pli proksimen. La manoj kunkroĉiĝas... Jes ja, ili ne estas artefaritaj.

La melodioj anoncas baraktan fortostreĉon de la homa volo kontraŭ la sorta kruelo, senindulga vivofantomato. La sonoj ploras, veas, tondras, animon skuas, fine venke jubilas, triumfe ĝojkantas. La genio de la aŭtoro sorĉe katenas la du animojn. La du manoj katene premas unu la alian. Larmoj de emocio ekfalas el la okuloj. La rigardoj altrafas la ekranon de la tempovizoro. Ankaŭ tie larmoj en la okuloj de la jarmilojn antaŭa publiko. En la lasta vico juna paro sidas. Samkiel ili nun, ili premas la manon unu de la alia. La prahomaj okuloj brilas brule, malseke, de sur la ekrano de la tempovizoro. La lunloĝantoj longe rigardas ilin, silentas... Fine la knabo mallaŭte ekparolas.

"Eble... eble tamen vi pravas."

KION NI FARU PRI SEKSO?

Hodiaŭ estas la epoko de la junularo. Ni ĉiuj kun intereso legas pri la plej lastaj manifestiĝoj de ĝia rimarkinda potenco, notas ĝiajn plej eksterordinarajn fenomenojn kaj ludas iomete la rolon de amatora psikologo. Le plenaĝuloj okupiĝas pri la gejunuloj kaj la gejunuloj okupiĝas pri si mem. Rezulte, ni estas bone informitaj pri la ofte konsternaj kreskoj en la nombro de krimoj inter la junularo, pri la nombro de okazoj de violento, pri bandaj interbataloj, junulara drinkado, drogoj kaj (kompreneble) sekso.

● sekso junulara monopolo

Sekso fakte fariĝis junulara monopolo. Ne la ago, sed la sugesto. En tiuj landoj kun tiaj ekonomiaj sistemoj, la reklamistoj daŭre malkrovas novajn, pli junajn merkatojn kontraŭ kiuj direkti ion kion oni trafe nomis "seksbomboj". La virino en tiu aŭ alia reklamo incite nudas ĉirkaŭ la femuroj ne simple por la 25-jaruloj, aŭ la 35-jaruloj, aŭ la 45-jaruloj, sed ankaŭ por la 15-jaruloj. Tiu knabino odoras kiel mediteranea rozo ne simple por eksciti la plenaĝulojn sed ankaŭ por eksciti nin.

Kaj ne nur la reklamistoj bombardas nin. La kruelaj faktoj de la vivo, dank' al la progreso en komunikado, dank' al la severaj realaĵoj de la postmilita periodo en kiu multaj el ni kreskis kaj ekkonsciis, trapikis nian haŭton multe pli frue en la vivo. Kiam televida aparato staras en la mezo de la sidĉambro oni malfacile evitas la terurojn de la milito. Kiam la lernejo ĉiam pli kaj pli proksimiĝas al la vivo — al praktiko, for de teorioj — oni nur pene sukcesas nekonscii pri la kruelecoj kiujn ĉiutage la homoj faras unu al la aliaj.

La biologoj ankoraŭ ne decidis ĉu la nuna emo al pli frua fizika maturiĝo ŝuldiĝas al la fenomenoj supre menciitaj, aŭ ĉu reklamistoj, celante pli fruajn merkatojn, nur sekvas biologian tendencon.

Ĉe la alia flanko de la medalo estas la fakto, ke homoj geedziĝas pli malfrue. Fraŭleco estas normala kaj akceptita stato dum longa periodo post fizika maturiĝo. La postuloj de nia teknologia socio estas tiaj, ke homoj havas ĉiam kreskantan bezonon de profesia trejnadado. Aldone al tio, la ekonomia progreso de la lastaj jaroj malfermis al novaj grandaj sociaj tavoloj la intelektajn avantaĝojn de universitata edukado. En multaj landoj estas tute

normale pasigi ses, sep aŭ ok jarojn post forlaso de gimnazio ankoraŭ studante. Geedziĝo, pro simplaj financaj cirkonstancoj, ne eblas.

Leviĝas do la demando: Kion ni faru pri sekso? Ni scias ke la ordinaraĵoj normoj de nia socio kontraŭas seksajn rilatojn ekster edzeco. Ni ankaŭ scias ke dum longaj generacioj oni en multaj landoj ne tro rigide sekvis tiujn normojn. Ni konas la faktojn pri sekso tre frue. Ne simple la fizikajn faktojn (dank' al pli "liberala" kaj pli "reala" edukado) sed ankaŭ la emociojn, la travivaĵojn kiuj akompanas ĝin. La televidaparato, la radio, la kinejo, la reklamoj, la modkantoj — eĉ la dancoj — senĉese liveras ilin al ni.

Ni scias pli multon pri sekso je nia dudeka jaro ol la meza homo antaŭ kelkaj generacioj eltrovis en la tuta vivo.

Sed ni ankaŭ konas la sociajn cirkonstancojn — la kreskantan statistikon pri neleĝaj naskoj, pri abortoj, pri seksaj infektaĵoj. Ni scias pri la mizero de senedza patrinceco, pri nedezirataj infanoj, pri mortoj sur la tablo de la kontraŭleĝa abortistoj.

Ni ankaŭ scias ke la socio multe kulpas pri ĉio ĉi, pro siaj antaŭjuĝoj kaj miskomprenoj kaj hipokriteco — sed pri tio mi ne parolas ĉi tie.

● tradicia moraleco kaj nova liberaleco

Fronte al la maro de mizero kiun ili vidas ĉirkaŭ si, la plenaĝuloj uzas kombinon de tradicia moraleco kaj nova liberaleco. Ili unuflanke donas al ni grandan liberecon, aliflanke insistas ke "normalaj" gefraŭloj restas ĉastaj. "Normaleco" kompreneble estas bona kriterio en ĉi tiu kunteksto. "Normala" unuo de la socio estas la familio. La familio kiel unuo respondas al bazaj naturaj bezonoj de la homo, sed ĝi ankaŭ estas iugrade socia kreaĵo, kaj ĝi bezonas specialajn klopodojn por ŝirmi ĝin kontraŭ atakoj.

Oni atentigas nin pri la postsekvoj. Se 17-jarulino gravediĝas tio povas efike fini ŝian lernadon, kaŭzi al ŝi terurajn sociajn problemojn, kaj doni al la mondo ankoraŭ unu psikologie probleman infanon. Se 17-jarulo insistas ke ĉiu knabino kun kiu li rendevuas enlitigu kun li, ekzistas risko ke tiu knabino kiu estas sekse plej libera gajnos ĉiun lian estimon kaj eĉ kondukos lin al malsaĝa kaj malfeliĉa edziĝo.

Ekzistis epoko kiam sekso pekulo estis forĵetita el socio. Nun la emo, pro ŝanĝitaj cirkonstancoj, estas "helpi" al li, reintegrigi lin. Samtempe, tamen, oni kondamnas tion kio logis lin for de la "normo" — "liberan" sekson, "sekson sen amo".

● kreiga nova moraleco

Sed pli kaj pli evidentiĝas ke la tradicia moraleco ne plu estas adekvata. Komunikado ne nur havis malbonajn efikojn ĉe parto de la junularo: ĝi ankaŭ pli bone informis la plenaĝulojn pri la mondo. Se okazas banda interbatalo en Palermo, oni post kelkaj horoj scias pri tio en Milano. Se abortoj plimultiĝas en Brazilo, oni informiĝas pri tio en Varsovio.

Eĉ pli grave, se la "liberala" edukado kaj la komunikado kaŭzis pli da problemoj, ili ankaŭ daŭre forigas la apation. Estas indikoj tra la tuta mondo ke fronte al la neadekvato de la tradicia moraleco, la nuna junularo elkreas la propran moralecon.

Neniu junulo povas dum jaroj suferi la seksbombojn de ĉiuj komunikrimoj sen formado de iu opinio. Kaj tiu opinio, tiu nova moraleco, estas ne nur nova, sed ankaŭ profunde morala. Antaŭ kelkaj jaroj, la juna generacio anstataŭ mortigi la anojn de la najbara bando eliris de la hejmo kaj mortigis la anojn de la najbara lando. Kompreneble, la diferenco estas pli ol diferenco de unu litero, sed ĝi ne estas diferenco inter blanko kaj nigro. Milito estas laŭleĝa mortigo — necesa eble, sed tamen mortigo — kaj tiuj kiuj mortigis en la tranĉeoj de Flandrio tute nature ne sentis bezonon, nek havis tempon, mortigi en la stratoj de Londono. Ili ankaŭ ne bezonis formuli la propran moralan kodon: la socion tion faris aŭtomate por ili.

● bono kaj malbono

Se oni militas, oni tion faras kun aprobo de la socio. Se oni havas seksajn rilatojn ekster edzeco oni tion faras sen aprobo de la socio. Kio gravas, en *morala* kunteksto estas la motivo. La nova moraleco havas kiel kriteriojn la du ekstremojn Bono kaj Malbono. Estas malbone senpense, sensente, sensense murdi. Estas malbone senkiale aŭ pro egoismo militi. Estas malbone simple pro momenta ĝuo amori.

KION NI FARU PRI SEKSO?

Sed, mi demandas min, kiom da studentoj, ekzemple, senpense aŭ sensente havas seksajn rilatojn? Mi kuraĝas supozi ke estas malmultaj. Mi ankaŭ demandas min, kiom da homoj antaŭ kvindek jaroj geedziĝis pro la plezuroj de amoro, egoisme? Mi kredas, multaj. Kaj kiom da anoj de antaŭaj generacioj, fronte al dek aŭ dekkvin jaroj da ĉasta matureco, al filmoj pri sekso, al libroj pri sekso, al reklamoj bazitaj sur sekso, al televido, al radio, al seksaj teknikoj, kredus ke abstino ĝustas aŭ justas.

La solvon de la afero mi ne scias.

Eble la plenaĝuloj pravas. Sed ili ne scias pli bone ol ni. La lumo de la Bono en la koroj de la junularo kreis pli plenan Junecon, kreis helpemon, kreis volontulajn organizojn de senprecedentaj proporcioj, kreis praktikan idealismon; la ombro de Malbono kreis senprecedentajn problemojn. La decido, miaopinie, restas kun ĉiu individuo. Kio gravas estas fidelo al la propraj idealoj. Hodiaŭ la junularo, pli ol iam antaŭe, havas la scion kaj kompaton por bone formi tiun idealon.

Junulo

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 45 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 19 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: 4 \$ (55 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

La Kolegio Strathmore

**vivanta
ekzemplo
por Kenjo**

Ĉiuj afrikaj gvidantoj konsentas ke la unua afrika malamiko estas senscio. Proksimume 80 procentoj de la indiĝena popolo estas ankoraŭ ne klerigitaj; kaj sen eduko, popolo malfacile sentas sin plene libera, eĉ se kolonia dominado finiĝis. Krome, sen eduko, preskaŭ ne eblas al nacio sin liberigi de tiuj du ĉefaj malamikoj: malriĉo kaj malsano.

Preskaŭ ĉiuj lastatempe sendependaj nacioj de Afriko frontas la problemon de homaj rimedoj, ĉar du aferoj okazas samtempe: unuflanke, la eksterlandanoj kiuj antaŭe okupis la ĉefajn postenojn en la lando, nun foriras; aliflanke, la ekonomio rapide ekspansias. Sed en Kenjo, ekzemple, eĉ en 1959, nur 120 studentoj eniris la du universitatajn kolegiojn de Orienta Afriko. Cetere, tiutempe la personoj kiuj efektive atingis universitatan nivelon konsistigis etan duonan procenton de tiuj kiuj dek du jarojn pli frue komencis elementan edukadon.

La pozicio en Kenjo nun pliboniĝis, sed en nove sendependaj landoj kiel Zambio kaj Malaŭio, tia situacio ankoraŭ ekzistas.



Kompreneble, oni ne povas trakti la edukan problemon nur surbaze de nombroj. Nove sendependa lando serĉas unuavice maturan kaj respondecan gvidkapablon. Tio speciale gravas kiam la cetero de la mondo alrigardas, skuas la

kapon kaj demandas: Ĉu ili vere kapablas regi sin mem?


Oni ankaŭ devas enkalkuli la specialajn sociologiajn kaj historiajn faktorojn kiuj influas difinitan socion. En Kenjo, ekzemple, 97 procentoj de la enloĝantoj estas

Kolegio Strathmore

afrikanoj, plejparte kamparanaj farmistoj. La azianoj, kiuj nombras ĉirkaŭ 160.000, en la pasinteco okupis plejparte la etkomercajn postenojn, kaj ankaŭ la plejparton de la mezgradaj ŝtatoficistaj funkcioj; dum la 50.000 eŭropanoj ĝis antaŭ trio da jaroj okupis la plejmultajn ĉefajn ŝtatoficojn, kiel ankaŭ preskaŭ ĉiujn grandajn farmbienojn. Tiuj ekonomiaj diferencoj kompreneble efikis socie. En Nairobi ĝis 1961 ekzistis "rezervitaj" loĝkvartaloj, kaj plejparte la afrikanoj loĝis en "lokalizoj" tute ĉe la randoj de la urbo — en domoj ofte tro enloĝataj, en kiuj ofte mankis modernaj faciligoj kiel elektro kaj kuranta akvo. Entute, eŭropano kutime konis azianon kiel minoran oficiston, aŭ kiel butikiston; kaj la afrikanon kiel serviston aŭ ĝardeniston aŭ oficejan helpiston. Afrikano konis eŭropanon kiel "estron", ĉu kiel domposedanton, ĉu en oficejo, ĉu kiel Regionan Oficiron en la kamparo. Socie la tri rasoj malofte renkontiĝis.

Skeptika

Estis do ne surprize ke en 1960 multaj homoj konsideris freneza la ideon de multrasa enloĝa kolegio por altgrada edukado. Kiel oni povus atendi ke la filo de brita arma oficiro dormus en sama ĉambro kun la filo de azia oficisto kaj du-tri filoj de afrika servisto? La angla junulo posedas motociklon kaj transistoran radion, tute al kutimiĝis al televido, la plej aktuala ĵazo, kaj tendencoj en moderna arto; la afrikano neniam antaŭe vizitis urbegon, ne posedas jakon kaj kutime marŝas senŝua: antaŭ nur kelkaj jaroj lia okupo estis gardado de la gepatra ŝafaro. La mezlernejo kiun li ĉeestis estis





tute for en la kamparo kaj, plue, estis probable ne nur unurasa sed unutriba. Rilate integriĝon de la rasoj, unu eminentulo malkaŝe diris: "Se vi sukcesos havigi unusolan eŭropan studenton vi rajtos konsideri vin feliĉaj."

Evidente multrasa enloĝa kolegio proponis grandegan defion, speciale el sociaj kaj rasaj vidpunktoj, ĉar oni neniam antaŭe provis ion similan. Ĉiuj lernejoj estis unurasaj, kaj multaj el la afrikaj estis unutribaj. Oni urĝe bezonis plene integritan multrasan kolegion. Sen tio, la diversaj rasoj eble neniam lernus fidi kaj kompreni unu la alian.


Ankaŭ de akademia vidpunkto, oni urĝe bezonis tian institucion, kiu preparus studentojn por la defioj de universitata vivo. Speciala Altlernejo, proponante dujaran antaŭuniversitatan diplomkurson, solvus tiun problemon. Kvankam komence altkosta, ĝi finfine ŝparus monon. Laboratorioj, edukiloj kaj konstruaĵoj altnivelaj allogus bone kvalifikitajn docentojn kaj la materialon mem rekompencus alta atingonivelo ĉe la studentoj. Ambaŭ tiuj prognozoj efektiviĝis.

Amikeca

En marto 1961 la kolegio, Strathmore, povis akcepti siajn unuajn studentojn, interalie eŭropajn. Post nelonge la multjaraj antaŭjuĝoj kaj artefaritaj baroj malaperis, kaj laŭ tute natura vojo. Per loĝi, studadi, manĝi kaj ludi kune, la tri rasoj trovis ke ili ĉiuj baze estas homoj, kun samaj problemoj kaj samaj ambicioj. La ĝenerala atmosfero de amikeco kaj bonhumoro estis helpata de tio, ke la instruistaro loĝis kune kun la studentoj, manĝante same ĉe la sama tablo.

Rilate studojn, oni grandskale antaŭenpaŝis pro la sistemo de persona instruado. Ĉiu stabano prenis sub sian personan superrigardon dekon da studentoj, kaj, per renkontiĝo kun ĉiu ĉiun duan semajnon, li povis doni multe da praktika helpo kaj kuraĝigo pri aferoj kiel studmetodoj, akademias problemoj kaj ankaŭ personaj problemoj kiujn eventuale havus liaj instruatoj. Sekve, multaj eksstudentoj aparte diris ke ili trovis sin jam adaptitaj al universitata vivo.

La kolegion administras Opus Dei, katolika asocio; kaj ĝi estas malferma al studentoj de ĉiuj rasoj,



Kolegio Strathmore

religioj kaj sociaj klasoj. Oni elfermas neniun personon kiu atingis la necesan akademian nivelon kaj kiu aparte deziras mem ion kontribui al multrasa socio. Ĉi tiu ĝenerala socia kaj kultura formado estas aparte valora aspekto de la vivo ĉe Strathmore. Oni ne lernas el libroj tiajn aferojn, sed oni ilin ensorbis tute nature per kontakto kun aliaj homoj, per libera interŝanĝo de opinioj pri ĉio kion la homoj ŝatas preparoli.

Entuziasma

Unu el la kialoj por la granda entuziasmo pri sia laboro kiun sentas la stabo kaj la studentoj estas la fakto ke ili vidas, ke ĝi estas tre proksime ligita al la

debatoj, en la kolegia gazeto aŭ (pli ofte) simple en privata konversacio. Oni invitas specialistojn el ekster la kolegio prelegi pri diversaj temoj; unu tre sukcesa serio da prelegoj pritraktis la plej popularajn profesiojn en Afriko — juro, politiko, agrokulturo, diplomatio kaj arkitekturo — ĉiuj traktitaj de spertulo pri la koncerna profesio.

Post du jaroj, ĉe la kolegio, la studento forlasas ĝin, plej ofte survoje al universitato, bone preparita por la plej multaj problemoj de la vivo. Intelekte kaj socie li multe maturiĝis. Estas sekve bedaŭrinde ke la kolegio ne povas doni tian okazon al multe pli da studentoj kiuj deziras sin dediĉi al sia lando. Malfeliĉe la granda plimulto de la studentoj finance ŝarĝas la kolegion. La registaro



laboro de la lando enĝenerale. La problemoj de naciigo kaj de kontinenta unueco en Afriko ne estas foraj, abstraktaj problemoj, pri kiuj oni legas en la ĵurnaloj; ili estas vivantaj priokupoj kiujn oni diskutas kaj pripensas, ĉu en

pagas iomete malpli ol duono de la kostoj, kaj la ceteron la kolegio devas liveri. La problemoj pri eltrovo de stipendioj por ĉiuj ĉi tiuj studentoj estas unu el la plej pezaj taskoj de la direktoroj. Oni povus iome ŝpari per malaltigo de

la normoj rilate manĝadon kaj loĝadon, sed tio, laŭ la opinio de la direktoroj, havus iom malbonan rezulton ĉe la efikeco de la kolegio rilate socian kaj personan edukadon.

Sendube kolegio kiel Strathmore havas ŝlosilan rolon en la evoluigo de Afriko. Devus ekzisti multe pli da tiaj kolegioj. Ĝi jam multon kontribuis al studenta vivo en Kenjo, sed tio estas kvazaŭ nenio kompare kun tio kion ĝi estontece povos fari se ĝi ricevos la necesan subtenon. En kunteksto de nacia evoluo kaj kontinenta unueco, kiel ankaŭ en la pli granda tereno de internacia kunlaboro, la studentoj de Afriko deziras ludi sian rolon en spirito de *harambee* ("ni kune tiru"), kiel ŝatas diri la kenjaj studentoj.

Jeremy White

Ĉasista festeno

Sinjoro Eleŝ ŝatis kapti ĉiun okazon kiu sin prezentis por fanfaroni pri siaj apenaŭ kredeblaj ĉasistaj sukcesoj.

"Ho jes," li diradis kun multsignifa rideto sur la lipoj, "oni ne povas 'fariĝi' ĉasisto; oni devas havi denaskan talenton por tio. Ekzemple, dum ĉasadoj, mi agas kvazaŭ kondukita de natura instinkto kaj neniam venis hejmen sen sufiĉa ĉasitaĵo. La trofeoj, admireblaj en mia domo, konvinke pravas tiun fakton."

Liaj amikoj ĝenerale apatie aŝkultadis lian sintrolaŭdon kaj nur malofte okazis, ke iu el ili ekatakis lian memkonstruitan prestiĝon per demando:

"Kiel eble? La plej menciinda kaptitaĵo iam ajn vidita ĉe vi... estis nur leporo aŭ perdriko!"

Post tiaj senrespektaj kaj degradaj rimarkoj, sinjoro Eleŝ kaptis sin per ambaŭ manoj je la kapo kaj indignite ekkriis:

"Kion fari, se pli ĉasindaj bestoj ne ekzistas en tiu ĉi regiono? Ho, kiam mi vivis en Subkarpatio, tiuj estis aliaj tempoj! En la tieaj praarbaroj, similaj al ĝangaloj, ni regule ĉaspelis aprojn kaj ursojn kaj ofte mortigis tiujn monstrojn per unusola ĉastranĉilo. KREDU al mi, tiuj luktoj estis vivriskantaj kaj postulis forton, kuraĝon, eĉ aŭdacon!" Post simila parolo sekvis mallonga paŭzo, dum kiu sinjoro Eleŝ esploris kaj ĝuis la efekton de siaj deklaroj kaj post ĝi li kutime modeste aldonis:

"Ne nur mi, sed ĉiuj miaj geamikoj, konatoj kaj kolegoj profitis el mia pasio; nome, post ĉiu sukcesa ĉaso mi invitis ilin al ĉasista bankedo, kiu ĉiam pruviĝis pli gaja, kaj amuziga, ol kiu ajn zorge planita karnavala balo. Imagu, ili estis regalitaj per specialaj gastronomiaĵoj, kiel ursopladoj, kuiritaj en ruĝa vino

kaj lerte spicitaj laŭ la receptoj de la mondfama ĉina kuirarto. Pri la trinkaĵoj estas pli bone ne paroli."

Foje la nereformebla fanfaronulo kaptiĝis per siaj propraj vortoj: liaj amikoj rekte kaj sencere monie postulis, ke li renovigu tiujn postĉasajn amuziĝojn. Ili diris: "Laŭ nia plej bona scio vi leporĉasos dum la venonta semajnfino. Invitu nin do al bona leporaĵo kun acideta saŭco kaj bulkobuloj. Iom da bonspeca vino estos ankaŭ bonvena."

Sinjoro Eleŝ paliĝis kaj deklaris per tremanta, raŭka voĉo: "Ho, la nuna financa situacio mia ne permesas tiajn diboĉadojn. Nuntempe oni ja devas centfoje pripensi la aferon antaŭ la elspezo de eĉ kelkaj cendoj. Ni ĉiuj devas pensi pri la morgaŭo, ĉu ne vere?" "Tondra fulmo frapu la mizeran ekonomian situacion!" kriegis la ĉeestantoj. "Ni amuziĝu; finfine ni vivas nur unu fojon. Ni bedaŭreme vidas, ke vi serĉas pretekston por ne regali nin, sed ĉifoje vi ne eskapos!"

"Amikoj!" balbutis sinjoro Eleŝ, "ni devas serioze prikonsideri la aferon..."

"Ni volas havi inviton!" bruegis la amikoj ĥore.

"Via deziro estas honoriga por mi," flustris sinjoro Eleŝ. "Mia edzino kaj mi estos ravitaj revidi vin sabatvespere, ni diru je la sepa."

La gastoj estis kontentaj kaj unu el ili proponis:

"Rigardu, amiko Eleŝ, ni ne volas, ke vi pensu nin profitemaj. Vi preparu la leporaĵon kaj ni prizorgos la vinbersukon. Konsentite?"

"Nenio alia estis farebla," konsolis sin sinjoro Eleŝ post la foriro de la gastoj. "Ili ĉiuj estas ja mem-

broj de la loka Ĉasista Societo, kies prezidantecon mi aspiras. Mi bezonas iliajn favorajn voĉdonojn okaze de la aŭtuna balotado."

Sabate frumatene sinjoro Eleŝ prenis do sian pafilon kaj ekiris al la kamparo por provi bonŝancon. Kiel kutime, li pafis nenion kaj prenis direkton al la stacidomo, havigis bileton kaj veturigis sin al la najbara urbeto, kie li regule aĉetis la "ĉasitaĵon".

Malagrabra surprizo! La vendejo estis fermita kaj afiŝeto algluita al la fenestro de la vendejo sciigis al la klientaro, ke "Pro manko de komercaĵo provizore fermita!"

"Ha, mi estus povinta scii, ke tiu ĉasista festeno kostos al mi ion. Mi devas iri al la ŝtelĉasisto por havigi leporojn kaj li postulos trioblan prezon por ili.

"Leporojn, kara sinjoro?" demandis la ŝtelĉasisto amare. "Bedaŭrinde eĉ leporidon mi ne havas. Unusola putoro estis mia kaptitaĵo dum la lastaj du semajnoj. Bonvolu aĉeti ĝin."

"Kion mi faru kun la putoro?" ekkriis sinjoro Eleŝ kolere. "Mi bezonas kvar aŭ kvin leporojn, ĉu vi komprenas? Leporojn! Ĉu via bofilo? Eble li havas ilin. Mi scias, ke ankaŭ li ŝatas ŝtelĉasi."

"Li ekŝiĝis el la profesio... aktuale li estas enloĝanto de la distrikta malliberejo. La ĝendarmoj kaptis lin ĉe freŝa ago... ses monatojn li ricevis. Eble post la paso de tiu periodo..."

"Ne ŝercu, mi bezonas leporojn kaj bezonas ilin nun, ĉu vi komprenas? Mi devas havi ilin, eĉ se mi devos mobilizi la armeon je ilia ĉaso. Diru mi petegas, diru al mi, kie mi povus havigi ilin," vortrapidis la postulema kliento. "Mi timas, ke mi povos diri nenion," respondis la ŝtelĉasisto malgaje.

ESTRARO DE T.E.J.O.

Ivo Osibov, prezidanto, Splitskog odreda 15, Split, Jugoslavio

Carlo Minnaja, ĝenerala sekretario, Viale Giulio Cesare 223, Roma 6, Italio

Marek Pietrzak, vicprezidanto, Dworcowa 1, Kluczbork, Pollando

Humprey Tonkin, vicprezidanto, 7 Linnaen Street, Cambridge 38, Mass., Usono

Ulrich Lins, kasisto, Gemarkenstr. 146, 5 Köln-Dellbrück, Germanio

Hans Bakker, eksteraj rilatoj, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z., Nederlando

Yoshimi Umeda, agado en Azio kaj Oceanio, ĉe Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanio

Svobodan Zlatnar, kulturaj kaj lernejoj aferoj, Rimska 7, Ljubljana, Jugoslavio

LANDAJ SEKCIOJ DE T.E.J.O.

AŬSTRALIO :

Daniel Kane, 5/55 Hardwick Street, North Melbourne

AŬSTRIO :

Hans Michael Maitzen, Mozartgasse 4, Graz

BELGIO :

Roger van Humbeeck, Dambruggerstraat 296, Antwerpen

BRITIO :

2 Edwina Gardens, Ilford, Essex

BULGARIO :

p.k. 587, Sofia

FRANCIO :

JEFO, 34 rue de Chabrol, Paris X

GERMANIO :

Dieter Kleemann, Fritz-Kalle-Strasse 26, 62 Wiesbaden

HISPANIO :

Salvador Aragay, Arce 8-2-4, Cornella, Barcelona

HUNGARIO :

HEA, Petöfi Sándor u. 17, Budapest 5

ITALIO :

Via Po. 7, Torino

JAPANIO :

1-13 Motomachi, Bunkyo-ku, Tokio

JUGOSLAVIO :

Terazije 42, Beograd

KOREO :

Taekeng Kim, 104-43 An Am-dong, Seong-Puk, Seoul

MADAGASKARO :

B.P. 1678, Tananarive

NEDERLANDO :

Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z.

NORDAMERIKO :

Shell, 2535 Hillegass, Berkeley 4, Calif.

POLLANDO :

Dubois 3, Wrocław

SVEDIO :

Jan Milld, Grimstagatan 35, Vällingby

SVISLANDO :

Edwin Thomas, Bielstrasse 16, 3250 Lyss

Ĉasista festeno

"Cerbumu, elpensu ian vojon por havigi ilin!"

"Rigardu, kara sinjoro, en tiu ĉi sezono leporoj estas havigeblaj nur..."

"Kie, kie do, eldiru la adreson, mi pagos vian penadon."

"En la paperaĵvendejo!"

"Kie? En la paperaĵvendejo?"

"Jes. Tiu negoĉejo havas neven-ditajn paskajn kartojn, kun bildoj de leporoj sur ili."

"Tigroj rompu viajn ostojn kaj hienoj dismordu viajn intestojn!" kriegis sinjoro Eleŝ, kiu ŝatis uzi "ĉasistajn" malbenojn. "Estas fia afero moki homon en mizero."

Hejme li konfidis siajn egan ĉagrenon kaj fiaskon al sia viv-parulino: "Karulino, la diablo forportis mian prezidantecon. Mi ne povos gastigi la samsocietanojn ĉi vespere kaj ilia venĝo estos terura: ili elektos mian rivalon, la veterinaron..."

La mieno de la edzino malheliĝis. Ŝi malamamis la veterinaron, ĉar lia edzino ĉiun dimanĉon iris preĝejon en nova ĉapelo kaj kondutis arogante, kie ajn ŝi aperis. Post sufiĉe longa meditado ŝia vizaĝo sereniĝis kaj ŝi diris: "Ne malgaju! Vi estos la prezidanto! Mi havus apopleksion, se la ino de tiu ĉarlatano de ĉevalaĉoj pavus kun la titolo de..."

"Vana sopiro sen leporaĵo!" respondis la edzo.

"Adolfo! Ĉu vi vere ne kapablas uzi vian cerbon? Vi devus porti pantalonon sur via kapo! Nenio estas pli facila, ol la solvo de nia problemo."

"Nu?"

La sinjorino obtuzigis sian voĉon kaj diris:

"Ni havas kvin katojn en la domo. Mortbatu kaj senfeligu tri aŭ kvar el ili. La katoj ne diferencas

multon de la raso de leporoj... ĉio alia estas nur demando de la kuirarto..."

"Estas vera ĉielbeno... tiu ĉi geniulino!" pensis sinjoro Eleŝ. Li dankeme kisis ambaŭ ŝiajn manojn, ekkaptis pezan bronzan kandelington, iris al la korto kaj deloge vokis la katojn...

Oni kuiris la leporaĵon en kaldrono; en unu alia bolis akvo por la bulkobuloj.

La vespermanĝo estis jam preskaŭ preta, kiam sinjoro Eleŝ frapis sian frunton kaj ekveis: "Ni forgesis ion pri la gastoj: ili ĉiuj estas ĉasistoj kaj trovos la leporaĵon sen kugletoj en ĝi — suspektinda."

"Ne ekscitiĝu pro ĉiu bagatelo! Ĉu mirinde, ke vi havas ulceron? Anstataŭ veadi, prenu vian pafilaĉon, enmetu nur malmulte da pulvo en la ŝarĝujon kaj pafu en la kaldronon. Ne timu... la malforta pafo ne truigos ĝian dikan metalplaton."

★

Sinjoro Eleŝ agis laŭ la konsilo de sia edzino, kiu ne konas la esprimon: "nesolveblaj problemoj". La leporaĵo treege bongustis, ĉiuj gastoj laŭdis kaj laŭdegis ĝin. Jes, sed kiu virino ne ŝatas aŭdi kaj milfoje reaŭdi himnojn pri sia sperteco en la kulinara arto?

Sinjorino Eleŝ ne estis escepto. Ŝi pridemandis la gastaron ĉiam kaj denove:

"Ĉu vere? Ĉu ĝi vere bongustis?" Nur la maljuna paroĥestro estis ankoraŭ intervjuota. Kiam la sinjorino faris al li la demandon, li mediteme respondis:

"Bona, bonega, delikata leporaĵo! ... Nur unu aferon mi ne komprenas: Kial estas la bulkobuloj plenaj de kugletaĵo?"

Ĉu vi vere amas?

Hodiaŭ ni demandas al la junaj geamantoj inter nia legantaro fundamentan demandon: **Ĉu vi vere amas?** Unu el la mitoj de la nuna tempo (eble de ĉiuj epokoj?) estas ke enamiĝo estas iu subita neracia eksplodo — ke oni scias tuj ĉu iu emocio estas "la vera amo" aŭ ne. Sed spertuloj pri sociaj demandoj kaj pri psikologio nin informas ke la afero ne estas tiel facila — ke amo estas pli subtila, pli nekonebla, ol ni naivuloj iam ajn imagis. Do, geamantoj, respondu sincere per "jes" aŭ "ne" (kaj atentu pri la sincero!) al ĉi tiuj demandoj:

1. Ĉu tiu ĉi afero okazis tute subite?
2. Ĉu vi pli multe amas kiam vi estas kun li/si, ol kiam vi estas sola?
3. Ĉu vi honeste kredas ke li/si estas vere la Plej Perfekta Persono en la monda?
4. Ĉu vi estas, ĝenerale parolante, iom malfeliĉa hejme kun viaj gepatroj?
5. Ĉu vi scias kion via amat(in)o opinias pri mono kaj infanoj?
6. Multaj homoj konsentas ke ne povas ekzisti vera amo sen komunaj intereso. Sed kio pri komunaj mizeroj? Ĉu vi ambaŭ havas relative rimarkindan aron da komunaj plendoj pri gepatroj, lernado, hejmoj kaj aliaj aferoj en viaj vivoj?
7. Ĉu vi estus tre ĵaluza kaj ŝagrenita se alia persono serioze klopodus forlogi lin/sin de vi?
8. Supozu ke via amat(in)o estas for de vi dum longa periodo kaj skribas al vi belajn kaj amoplenajn leterojn. Ĉu vi montrus ilin al viaj geamikoj?

9. Kiam vi ne estas kune, ĉu vi pasigas vian tempon malfeliĉa, sen la kapablo multon fari krom sopiri al li/si?
10. Ĉu vi trovas ke, rilate ĉi tiun personon, vi ĉiam volas prezenti vian plej bonan flankon, kaj do zorge priatentas tion kion vi diras kaj faras?

Kaj nun venas la ŝoko. Vi verŝajne pensis ke aro da jesaj respondoj montras vian eternan amon. Tute male! En ĉiu okazo le **nea** respondo estas la ĝusta, krom ĉe demando 5, kie la **jesa** estas ĝusta.

La kialo? Amo ne estas afero kiu forprenos vian ekvilibron kaj puŝos vin en ekstazojn de alternaj ĝojego kaj malespero. Eble dum la unua duonhoro, jes — sed verŝajne vi ne enamiĝis interne de la pasinta duonhoro! Amo devas daŭri longe, kaj tio postulas racian, praktikan kaj interkomprenan rilaton. La demando ne estas ĉu la nazo de la amat(in)o estas perfekta sed ĉu vi povas akcepti ĝian torditecon!



Pri poentoj: unu poento por ĉiu "ne" krom ĉe 5, kie vi ricevu anstataŭe poentoj por "jes". Se vi gajnis 7 ĝis 10 do ŝajne temas pri la vera afero. Se inter 5 kaj 6, eble amo burĝomos el la rilato sed ĝi ankoraŭ ne estas tre firma. Se malpli ol 5, via koro tamen ne rompiĝos, malgraŭ ĉio!

NIAJ KONTRIBUINTOJ

Andreo Szabó jam kontribuis al Kontakto kaj estas konata al niaj legantoj kiel talenta novelisto kaj junulo el Hungario.

La artikolon de **d-ro K. Kussinszky** liveris al ni la Loka Kongresa Komitato de la 22-a TEJO-Kongreso, kiu okazos en julio en Pécs.

Sandor Bako, hungaro kiu nun loĝas en Usono, lastatempe sin prezentis en la Esperanta literaturo per sia novelaro Tiaj ni estas, el kiu ni elektis la nunan rakonton. La libro, kiu ankaŭ eldoniĝis en la angla lingvo, estas havebla ĉe ĉiuj libroservoj, por tiuj kiuj deziras pli profunde esplori liajn verkojn.

Walerian Włodarczyk, pola ĵurnalisto, konata al la legantoj de Kontakto, ankaŭ ĵus verkis poemaron. Ĝi aperis sub titolo Mio Mia ĉe Pola Esperanto-Junularo.

La artikolo de **Jeremy White**, ano de la Kolegio Strathmore, unue aperis en la revuo The Student. Ni dankas al ties redakcio pro permeso pri reapergo.

Paul Schunck estas aktiva en la Esperanto-movado en Sarlando, Germanio. Inter alie, li ĉeestis la 14-an IJK de TEJO, en Homburg. La citaĵoj kiuj akompanas liajn fotojn estas (kelkfoje torditaj) versoj el la Esperanta literaturo.

**Varbu
abonantojn!**


**Varbu
reklamojn!**

POST LA 50-A UNIVERSALA KONGRESO

en la movado ekestis granda interesiĝo pri Japanujo. Mendu ĉi tiun luksan gvidilon tra la japana vivo!

400 nomoj aŭ terminoj, tola bindaĵo kun kartona skatolo, riĉa ilustro. Prezo: 18 gld (72 st) Sola vendraĵto ekster Japanujo:

U.E.A.




ENCIKLOPEDIETO JAPANA

NOVA ELDONO EN LA FAMA SERIO ORIENTO-OKCIDENTO (N-RO 6)

REGO LEAR

Bind.	tragedio de	160
16,50 gld.		paĝoj
Broŝ.	tradukis	21 x
14,— gld.	K. KALOCSAY	15 cm.



Unu el la plej grandaj kaj emociaj dramoj de William Shakespeare, **REGO LEAR** nun aperis en la definitiva traduko de

K. KALOCSAY,

memore al la 350-jara datreveno de la morto de la aŭtoro. Brilkvalita teksto, bela bindo, formato de "Naŭzo", "Kalevala" ktp.

Eldono de Universala Esperanto-Asocio


Eldono de KOSMO Traduko de T. Nakamura

Okakura kakuzo

LA LIBRO DE TEO

Studolibro pri orientaj ideoj kaj idealoj

142 p.
luksa
prezento



\$ 2,50
9,— gld.
36 st.

"Kiam venis Enciklopedieto Japana, mi estis konvinkita, ke tiu libro estas apenaŭ superbla. Sed ĝen La Libro de Teo ĝin superatutis!"

Juan Régulo-Pérez


Sola vendraĵto ekster Japanujo: UEA

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Miĥail Lermontov, la granda majstro de la rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn rakontojn en la traduko de D. Staritsky.

Kun bibliografio de Lermontovaj verkoj en Esperanto

Moderna plasta kovrilo

Prezo: 5,— gld.
(20 steloj)



Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj kroĉiĝanta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.